

# *Kluba Bulteno*

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 5 2010

Vendredon la 29an de oktobro

58a jaro

## Kalendaro

(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / *Hvor?* – vd. malsupre / *se nederst*)

**Lundon la 1an de novembro**(semajno / uke 44) – mandag

"Socialaj retejoj": Vizaĝopaĝo, Kvivit, Skajpo, Iperno ... Nia studasocio aranĝis kunvenon pri ili, kaj ĝia ĝen. sek. verkis personan rekomendon\*. Kiel uzi ilin? Ĉu utilaj? Ni diskutos.

"Sosiale media": Fjesbok, Twitter, Skype, Ipernity .... Studieforbundet vårt har holdt et møte om dem, og dets gen.sek. har skrevet en personlig anbefaling\*. Hvordan bruke dem? Kan de være nyttige? Vi diskuterer.

**Lundon la 15an de novembro** (semajno / uke 46) – mandag

Ni daŭrigos la laboron pri nova turisma broŝuro pri Oslo cele al la planata postkongreso en Oslo 2011.

*Vi fortsetter med å utforme en ny turistbrosjyre om Oslo, med sikte på den planlagte etterkongressen i Oslo 2011.*

**Lundon la 6an de decembro** (semajno / uke 49) – mandag

Same kiel la antaŭa kunveno.

*Samme som forrige møte.*

**MERKREDON la 15an de decembro** (semajno / uke 50) – ONSDAG

La Zamenhofa tago. Literatura kunveno. Ĉiu prezentu iun libron.

*Zamenhof-dagen. Litteraturmøte. Alle presenterer en bok.*

**Lundon la 3an de januaro** (semajno / uke 1) – mandag

Same kiel 15 novembro.

*Samme som 15. november.*

\* Vidu en interreto ĉe:

[folkeakademiet.no/index.php?artID=2361&navB=305](http://folkeakademiet.no/index.php?artID=2361&navB=305) kaj  
pri uzo en VOFO (Voksenopplæringsforbundet):  
[folkeakademiet.no/index.php?artID=2356&navB=305](http://folkeakademiet.no/index.php?artID=2356&navB=305)

**Kunvenejo** ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (tramo) laŭ la samnoma strato.

# OkazIS

## Lundon la 6an de septembro

Nia gasto Gerardo Tobias el Pollando, kiu vizitis nin unuafoje en 1993 kiel gvidanto de Esperantotur, estas nun efektive politika rifuĝinto, kaj intertempe pasigis 11 jarojn en Usono kiel fremdlaboristo.

Dum li ankoraŭ havis laboron – en hotela kuirejo – li bone vivis, kaj havis lignon kaj taŭgajn maŝinojn por produkti siajn artaĵojn: ŝipoj kaj puzzle kunŝoveblaj mebletoj. Li ankaŭ vizitis Esperantokongresojn kaj informis pri Esperanto en granda junulara kristana festivalo.

Sed poste, kiel senlaborulo, li konatiĝis kun la suba tavolo de la usona socio: senhejmuloj, alkoholuloj, mizeruloj, kiuj ŝtelis de li liajn materialon kaj aparatojn. Pri ili la polico ne interesiĝis, sed jes pri tio ke lia vizo eksvalidiĝis, kio rezultigis restadon en diversaj malliberejoj sub aĉaj kondiĉoj.

En Norvegio la butikoj forĵetadas amason da bonaj manĝaĵoj. Simile en Usono, sed la diferenco estas, ke tie ankaŭ mortas homoj pro malsato sur la strato ekstere.

Pri Esperanto li vigle informis, sed helpon ne ricevis.

Fine oni forsendis lin al Pollando, kie li ne plu havas hejmon .... Sed tio estos alia historio.

Gerardo ankaŭ regalis nin per abunda vegetara supo kaj luksa pano (ĉiom senpage trovita).

## Lundon la 20an de septembro

Mireille Grosjean, pacinstruisto kaj esperantoaktivulo, havas plenan vojaĝprogramon ĝis la fino de 2013. Sed feliĉe por ni ĝi inkluzivis semajnon en Oslo okaze de seminario de la Internacia Pacburoo.

En la kunveno ŝi unue invitis nin al cerbosturmo pri informado: flagoj sur bicikloj – farbado de forbalaita neĝo – okazigi skandalon por la gazetoj – vojŝildoj al la klubejo. Sekvis multflanka interparolo pri ŝiaj kaj niaj spertoj pri la rilatoj inter Esperanto kaj la mondo – en Svislando, kie la lando estas plurlingva, sed ne la homoj, en Francio, kie oni eltrovas novajn metodojn, kiuj ne nepre taŭgas por Svislando, en Japanio kaj Svedio, kaj en Norvegio.

Kio okazas aŭ ne okazas kaj kial ne? Multon ni povas atingi per pensiga frapfrazo: Mi uzas la anglan por aĉeti flugbiletojn, sed Esperanton por trovi amikojn.

## Merkredon la 22an de septembro

Havante tiel interesan gaston, ni riskis aranĝi duan kunvenon kun ŝi. Kaj ni ne pentis: Mirejo estas sperta instruisto kaj ŝi sukcesis engaĝi nian atenton pri la specialaj lingva, leĝa kaj politika strukturoj de Svislando – multaj el ni ne antaŭsciis ekz-e ke la romanĉa lingvo estas komuna skribonormo farita antaŭ nelonge surbaze de kvin tute nesimilaj dialektoj – kaj precipe pri la ebloj de la civitanoj postuli referendumon je nacia, kantona aŭ

urb(et)a nivelo. Svislando aniĝis en UN maljam en 2002 – sed kiel la sola lando kie la popolo decidis!

Ni anoncis la kunvenon al la publiko per afiŝoj kaj gazetanoncetoj, kaj venis du amikoj de membroj. Tial ni aranĝis tradukadon – kion bone prizorgis nia plej juna membrino – kaj efektive tio ne ŝarĝis la kunvenon, sed iel helpis dialogigi la etoson.

### **Lundon la 4an de oktobro**

Snorre Benum estis tre kontenta pri sia partopreno en la Universala Kongreso en Havano. Lin ravis precipe la kulturaj prezentoj: la recitalo de la aktorino Georgina Almanza kaj la

muzikgrupo "Amindaj" (vd. ankaŭ revuon *Esperanto*, septembran, mezajn paĝojn). Kaj afablecon kaj helpemon li renkontis ĉie ĉe la kubanoj, i.a. ĉe loka PasportaServano, kiu aranĝis kroman tranoktadon por li.

Sed povis kongresi nur du usonanoj – aliaj ne ricevis vizon.

### **Lundon la 18an de oktobro**

Turisma broŝuro pri Oslo por la postkongreso 2011. Ni preparis liston de novaj vidindaĵoj kiuj ankoraŭ ne ekzistis kiam aperis la lastaj E-broŝuroj en 1952, la jaro de la UK en Oslo.

DD

---

**Tamen ne povis veni** Drissa Diakite el Bamako, la ĉefurbo de Malio, (kie li estas UEA-delegito), ĉar la (dana) ambasado ne sufiĉe frue traktis lian vizopeton.

---

## **Bibliotekaj libroj al la Nacia Biblioteko**

Kelkaj libroj destinitaj al la deponejo de la Nacia Biblioteko en Mo i Rana restas ankoraŭ kelkajn semajnojn en Esperantonia. Do lasta ŝanco trarigardi ilin!

### ***Har du lagringsplass hjemme?***

*Vi har i kjelleren her boklageret fra Esperantoforlaget, nå overtatt av klubben vår. Mye av dette er ikke ting som behøver å ligge akkurat her. Hvis noen kunne lagre noe av det hjemme, ville det frigjøre plass som trengs til mer aktuelle ting (f.eks. deler av Forbundets bibliotek, som vi er i ferd med å flytte hit fra magasinet i Hamar bibliotek). Si fra til kontoret hvis du tror du har mulighet for å hjelpe*

---

### **Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?**

*Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.*

# Ĉu kunveni marde?

Antaŭ du jaroj ni dissendis enketon, kaj sekve de la respondoj decidis kunveni nur lunde. Antaŭe ni kunvenis lunde kaj marde alterne. Avantaĝo de la malnova sistemo estis ke tiuj kiuj estas ĉiam okupitaj lunde, tamen povas veni al iuj kunvenoj. Malavantaĝoj estas ke oni malfacile memoras kiam kunvenoj okazas, kaj ke ne eblus luigi la ĉambron ĉiulunde nek ĉiumarde.

Se nun la preferoj aliĝis, kaj estas intereso por fari ŝanĝon, ni povos reenketi kaj ev. levi la demandon en la jarkunveno en marto. Do bv. mesaĝi pri via opinio.

---

## Alekstera agado

Ankaŭ ĉi-jare ni starigos informbudon en la konferenco pri tutmondiĝo (*Globaliseringskonferansen*) en Folkets Hus. Ni havas bonan sperton pri tiu konferenco en pli fruaj jaroj, sed ĉar la Ligo eksiĝis el Norvega Socia Forumo (kiu aranĝas la konferencojn), ni rajtas havi budon nur sabaton – la 20an de novembro (semajno 46). Ni bonvenigos helpon.

## Eŭropa tago de lingvoj – mankis homoj kaj gradoj

Ni esperis starigi informbudon 26. septembro ekster nia pordo sur la trotuaro, sed ne realigis tion, pro malvarma vetero kaj malmulte da preterpasantoj.

---

## Postkongreso en Oslo 2011

Kelkaj klubanoj planas tri-tagan turisman postkongreson en Oslo post la Universala Kongreso en Kopenhago venontjare. Se vi interesiĝas helpi, bv. turni vin al Cato Haugen <pluto8008[a]gmail.com> poŝtlf. 452 88 435.

---

## Ni vendas librojn, insignojn, glumarkojn

Krom libroj (lernolibroj, vortaroj, literaturo) nia klubo vendas i.a. ruĝajn glumarkojn (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko .... po 2 kronoj; kaj diversajn insignojn / *jakkemerker* (verda stelo).

Ankaŭ (svedajn) kun verda stelo kaj la vorto "Esperanto" kaj en parolveziko. (Videblas interrete ĉe esperanto.se).

---

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94  
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>  
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).